Tiu eta speco de makako – plenkreska ĝi staras je 75cm alta – troviĝas ĉe Ĝibraltaro, kien oni enkondukis ĝin verŝajne el Afriko. Ĝia natura loĝloko estas arbaro en Alĝerio kaj Maroko. Ĉiu familia grupo havas sian propran teritorion, kaj ne intermiksiĝas kun aliaj familioj. Tamen ... kio okazas post noktiĝo? Iliaj genoj iel intermiksiĝas tutsane!

La brita klimato taŭgas por tiu endanĝerigita specio, ĉar ĝi toleras vintron, kaj grupe kunpremiĝas por varmiĝi dum frosta vetero. Junajn simiojn oni sukcese liberigas en naturaj afrikaj loĝlokoj.

La loko ravis nin. Sergej kaj Lidia multe fotis. Tre proksime, junaj simioj akrobatis en antikvaj kverkoj, dum pli aĝaj elekteme prenis grajnoj el la herbejo aŭ fingre kombis unu la alian. 'Simioj ne suferas pro puloj,' informis aŝiŝo. 'Tio estas natura amika konduto inter makakoj'.

Mi ne aŭdis eĉ unu vorton en la angla de Sergej dum la semajno – kiel oni supozus dum Somera Lernejo. Lidia, kiu bone scipovas kaj la anglan kaj Esperanton, tradukis aŝiŝojn en la rusan, kiam necesis. Tamen Sergej bone komprenis Esperanton, kaj lia parolata Esperanto ĉiutage pliboniĝis. La revo de Lidia ekde infaneco estis viziti Brition, fine realigebla pere de Esperanto.

Joyce Bunting



Plej supre: Ekspozicio pri la projekto Lingvolanĉilo dum la Somera Festivalo. Meze: Instruado kaj amuziĝo. Sube: Esperantistaj gastoj Sergej kaj Lidia el Ruslando.

RETE KAJ LETERE

Historio de Biblioteko Butler

Estimata redaktoro,

Mi legis kun miro la leteron de Dermod Quirke pri la Butlera Biblioteko (*EAB-Ĝisdate* 38, p.12). Se tiu letero estas preciza historio, la rifuzo de la malavara propono de s-ro Quirke estis unu el la plej gravaj krimoj kontraŭ Esperanto en la ĉi-landa historio de la Esperanta movado (la alia kompreneble estis la ĉesigo de la partamenta grupo).

La provizo de moderne indeksita biblioteko en la ĉefurbo ne nur estus prestiĝplena kaj atingebla utilaĵo por stud-

BY E-MAIL AND LETTER

antoj, esploristoj kaj verkistoj, ĝi forigus la neceson por EAB forkuri de la ĉefurbo por enterigi sin en 'memorial hall' en malfacile atingebla urbeto. Sen la 'blanka elefanto' de biblioteko, kiun malmulte da personoj povas uzi, EAB estus povinta akiri pli modestan sidejon en aŭ apud Londono aŭ alia granda urbo.

Kial oni ne konsultis la membraron?

Rik Dalton, Leeds

Redaktoro: Iuj esprimis la opinion, ke la afero estas 'prahistorio' kaj tial ne indas respondi, sed

venis la sekva neoficiala reago: 'La decidon pri Biblioteko Butler oni faris antaŭ 30 jaroj. Tio ne estis la respondecado de la nuna estraro. Konsila Komisiono tiutempe kunvenis ĝis trifoje jare, do sendube diskutis la estontecon de la biblioteko, samkiel la decidon fine ne aĉeti bienon en la mezo de Britio. Poste fondiĝis EAB kiel bonfara asocio, kaj Biblioteko Butler ĉe Holland Park Avenue.'



Does Esperanto exist?

Following the presentation by Professor Grin, to the European

Parliament, within the ALDE grouping, David Curtis has written to his Euro-MP about Esperanto's potential. The full report on the ALDE Hearing, including detail of Esperanto Lobby's Press Release to the British national media, as well as the translation problems concerning the new EU Treaty can be seen at <http://liberafolio.org>. You may need to click onto 'Corsetti: EU-leĝaro estu komprenebla'.

Because some British members of the European Parliament claim that Esperanto is not an 'existing language', Esperanto Lobby wishes to counteract this.

May I ask you to e-mail or write to your local Euro-MP?

Contact details are available at <http://eurparl.org.uk>.

An analysis of Professor Grin's presentation can be seen at: <http://lingvo.org/grin/>
 Brian Barker,
bribarker@hotmail.co.uk



Ne 'el nenie', sed el la interreto

Kara redaktoro,

Laŭ via espero, ke mi sendu elprintaĵon de miaj tradukoj angla kaj skota de *La infana raso*, mi provizore sendis al Barlaston por la Biblioteko Butler kompaktan diskon (ne paperan elprintaĵon) de la teksto.

100 years BEA (Inc) Ltd

In May this year a certificate was sent from Companies House congratulating the British Esperanto Association (Incorporated) Limited on celebrating 100 years as a Registered Company.

I knew that BEA was founded in 1904, so went back to the archives, under the guidance of Geoffrey King, our Honorary Librarian, and had a look to see how it had been achieved.

In February 1906, the *Konsilantaro* of BEA appointed *sinjoroj* Lambert, Blott and Cowper to look into the matter of registering the Association as a Company, a matter which had been considered necessary for some time.

They suggested that BEA be registered under 'Industrial and Provident Society Act 1893', and were then commissioned to prepare a proposal for the AGM. So in July 1906 they stood in turn to explain their findings to the general meeting. After registration, the Association would be able to acquire capital by selling shares, and pay 4% cumulative dividend. Profits would be for the use of the Association, and the word 'Limited' would appear in the title. After a lively debate the proposal was 'unanimously accepted except for one voice'.

In August, Mr Blott and Mr Lambert reported that the Registrar of Friendly Societies had refused the application and suggested it be registered under the Companies Act 1897, section 23. As such, the company would be able to trade, but any profit was for use of the Association only. There would be no shares and no dividends.

The Board of Trade approved the proposal in January 1907, provided that announcements were placed in the national press - *Daily News* - and that the necessary changes to the governing document were approved by the AGM.

The general meeting took place at 14 Norfolk Street, London, and in spite of complaints by the Edinburgh Association the matter was approved and the final step was taken on the 1 May 1907.

BEA (Inc) Ltd is dormant now, though still registered.

JMB

Centenary Certificate
 of
British Esperanto Association
(Incorporated) Limited
 Registration Number: 00093189
 I hereby certify that the above company
 incorporated on 01 May 1907
 has today been registered at
 Companies House for 100 years.

Chief Executive and Registrar of
 Companies for England and Wales
 01 May 2007



RETE KAJ LETERE

Mi profitas de la okazo, por aldoni ion al mia letero en la pasinta numero de *EAB-Ĝisdate*, pri la lastatempa kresko de nia eta Esperanto-Asocio de Irlando dank' al enmigrado. Mia edzino komentis, ke ne estas ĝusta tio, kion mi diris pri apero de novaj membroj 'el nenie'. Ŝi klarigis, ke tiuj novaj anoj *ne* aperis el nenie, sed el la interreto. Ĉiuj el ili legis aŭ la retpaĝojn de la irlanda asocio aŭ la 'blogon' de Gabrielo, unu el niaj novaj junaj membroj. Plie, ĉiuj el ili (inkluzive de Gabrielo) lernis Esperanton per la tuttera teksaĵo, kaj post surprize mallonga tempo parolas ĝin kun bona akĉento, sen antaŭe havi personan renkontiĝon kun aliaj esperantistoj. Tiun potencialan fonton de novaj



Fotis Viliĉjo Walker

esperantistoj mi varme rekomendas al aliaj asocioj, inkluzive, kompreneble, de la brita.

Girvan MacKay,
Irlando

Studsiesio en Biblioteko Butler ĉe Wedgwood Memorial College, dum la ĉi-jara Somera Festivalo en aŭgusto. Multaj utiligas kaj ĝuas la kulturalan posedaĵon de la asocio.

MALLONGE

• **Esperanto en *Le Figaro***
Dank' al s-ro Etuo Miyosi (Ecuo Mijoŝi), prezidanto de la japana akcia societo Swany Corp, la franca ĵurnalo *Le Figaro* (ĉiutaga eldonkvanto pli ol 420 mil ekzempleroj) denove publikigis, la 3-an de aŭgusto, anoncon pri la lingva problemo en Eŭropa Unio kaj pri Esperanto kiel solvo.

En ĝi aperas i.a. la freŝdata pledo de la Nobelpremiito Reinhardt Selten por Esperanto kiel unua fremda lingvo en la lernejoj (vd. n-ron 38 de *EAB-Ĝisdate*, p. 1-2), klarigoj, pri la maljusteco kaj maltaŭgeco de la eŭropa lingva politiko, tri fotoj (Selten, Margareta Handzlik, Esperanto-parolantaj infanoj), retejaj adresoj de Esperanto-France, EEU, UEA kaj de retpaĝaroj, kie la legantaro povas ekscii pli. Du ĉapitroj el la frandlingva biografio de d-ro Zamenhof *L'homme qui a défié Babel* (La homo, kiu defiis Babelon) estis tiucele enretigitaj ĉe: www.esperanto-sat.info/article1028. (Laŭ Gazetara Servo de SAT-Amikaro.)

Make sure every newsroom has one!

New information CD! An ideal attachment to any media comment on Esperanto

• *A Journalist's Guide to Esperanto*. Barlaston: EAB, 2007. English-lang. CD. What journalists ought to know about Esperanto. Adapted, the information is useful in any context. Price: £2.50 plus p.&p.

- Esperantisto serĉata por Rumongo
- UEA-seminario en Burundio

Ĉu vi emas Afriken?


La Afrika Komisiono de UEA ĉe la Afrika Oficejo de UEA (BP 416, Lokossa-Mono, Benino; tel. +229 22 41 02 29; rete: afrika.officejo@esperanto.org) serĉas kompetentan esperantiston, kiu propra-koste (almenaŭ grandkvante) iru al suda Burundio por instrui Esperanton. Povas esti, ke la posteno jam estas donita, sed se vi interesiĝas, ne prokrastu.

Oni aranĝas en Burundio seminarion. Kial ne partopreni? Ĉi temos pri 'Instruado de Esperanto por evoluigi la afrikan kulturon' kaj okazos en Rumonge de la 22-a ĝis la 29-a de marto 2008. La programo proponos kursojn de Esperanto por progresantoj kaj progresintoj el pluraj afrikaj landoj, kiuj lernis el la lernolibro *Gerda malaperis* kaj intencas partopreni en la ILEI-konferenco kaj ekzameniĝi por esti instruistoj de Esperanto en Afriko. Krome, estos kursoj por lokaj komencantoj. La aliĝkotizoj estas por afrikanoj 3 usonaj dolaroj, por eŭropanoj laŭ interkonsento. Eblas partopreni ankaŭ kiel kiel stud-gvidanto.

Informojn liveras s-ro SABIYUMVA Jérémie, BP 170 Rumonge, Burundio; rete: jerrybs21@yahoo.fr.

NEW books *and more*

• Order on-line at <http://www.esperanto-gb.org/eab/bookcat.htm> or by sending a cheque, made payable to 'EAB'. Please remember to add 15% to the total of your order to cover post & packaging.



Ajfero de Espero Heidi Goes
Rotterdam: UEA, 2007, 86p. PB. History of the Esperanto movement in Africa. £6.20

Beginner's Compact Dictionary of Esperanto, A V.R. Potturu
FEB, 2007 (2nd ed.) 198p. PB. 3,500 root words in Esperanto are translated into English, and 7,500 from English into Esperanto. Includes a short introduction to Esperanto grammar. £3.50

Blondulo Sigurbjörn Sveinsson
Gardabaer, 2007, 48p. PB. A charming story of a boy who wanted to travel far, far away, and see the world. Translated by H. Sæmundsson from the Icelandic. £5.10

Dr Esperanto's International Language L.L. Zamenhof
Berwick: Verkista, 2007. 48p. PB. The 'first book' in which Zamenhof presented Esperanto and its grammar to the world. The English version was translated by Richard H. Geoghegan; this 2007 edition has a modern preface by Gene Keys. £2.50

Esperantaj Krucvortenigoj ELNA
USA, 40p. PB. 20 easy crossword puzzles for beginners. The first (short) puzzles have definitions in English, the later (longer) ones are completely in Esperanto. Solutions included. £1.50

Germanaj Biero Kaj Bierkulturo Harald Schicke

Scheesel: MZ-Verlag, 2006 (2nd ed.) 119p. HB. Beer is an important beverage in Germany, with over 5,000 brands, and accompanying special glasses, trays and beer-mats. This book presents an overview of a cultural phenomenon. Colour illustrations. £8.80

Jim' la Migrulo Siegfried Stampa £9.40

Dobrichoviče: Kava-Pech, 2007, 175p. PB. The tale of a young leopard living with his mother and siblings in the coast range of Cape Province, South Africa. Illus. by the author; trans. by Rüdiger Sachs.

Kunvojaĝu Paul Gubbins £12.25

Pisa: 2006 (2nd rev. ed.), 239p, 21cm. An international course, designed for classroom use, with an emphasis on practical and commercial uses of Esperanto.


Kosmo kaj Ni, La Galadí-Enríquez, Amri Wandel £12.25

Antwerp: FEL, 2005 (2nd ed). 222p., illus., 21cm. Complete handbook on theoretical and practical astronomy, incl. discussions on galaxies, planets and life in the universe.

Leksikaj Ekskursoj 3 Ch. De Vleminck, E. Van Damme £10.20

Antwerp: FEL, 2005. 190p., 21cm. Language exercises on contrasting themes to enrich your vocabulary.

Mortopuno: Faktoj kaj Dokumentoj Paris: SAT, 2007, 154p., 21 cm. Translated essays by international authors on the subject of the death penalty, with a foreword by Ronal Creagh. £6.00



Vikipedio Praktika Manlibro (dua eldono) Yves Nevelsteen (ed.)
Slovakia: Espero, 2007, 37p. (colour), 14cm. Vikipedio is the Esperanto-language version of Wikipedia, the internet's largest on-line encyclopaedia. This handbook introduces Vikipedio, explains why it is important for the Esperanto community, and how you can contribute by creating, enlarging and correcting articles. £2.00

Vizito sur la Teron István Nemere
Moscow: Impeto, 2001 168p. PB. Someone or something arrives on Earth, spends a few days on the planet, and leaves; a science-fiction story with some fantasy elements, written in the style of the 1970s. £4.50

Compact discs

Milan Dočekal el la grupo TEAM' kantas (ne nur) en Esperanto Milan Dočekal
Martin, 2007. Three pieces in Esperanto and three in Slovakian. 21 minutes. £12.00

JoMo Friponas JoMo
Donneville: Vinilkosmo, 2001. An eclectic collection of 14 songs in a variety of styles. Some are translations ('Ĉu vi volas danci?', 'La Bamba'), others originally written in Esperanto. Includes booklet of lyrics and photos. £12.70

JoMo Slavumas JoMo
Donneville: Vinilkosmo, 2006. 24 tracks of music adapted from or inspired by a variety of central-European styles. 70 minutes. £15.65



• Eskapu someren al la Oceania Kongreso en Nov-Zelando

De la 14-a ĝis la 23-a de januaro 2008 okazos Oceania Kongreso de Esperanto en Auckland, Nov-Zelando. Oni aranĝas ekskursojn, distrajn vesperojn, debatojn, bankedon, teatraĵojn kaj kursojn. La kongresejo, kun surloka loĝado, situas inter la internacia flughaveno kaj la urbocentro de Auckland. Kotizoj estas 'ne-multekostaj': ekde 425 eŭroj por loĝado, manĝoj kaj partopreno en la kongresa programo, inkluzive de dumkongresaj kursoj. Oni forte esperas, ke multaj eksterlandanoj partoprenos en la kongreso. Pliaj informoj kaj aliĝilo videblas ĉe www.esperanto.org.nz. Informis David Ryan, prezidanto de NZEA; rete: ryangomez@xtra.co.nz.

• **Muzeo informas Esperante**
La nacia muzeo de Port-Royal-des-Champs, Parizo, havas plurlingvan retejon (www.port-royal-des-champs.eu) i.a. en Esperanto. La diversaj lingvoj estas atingeblaj nur tra Esperanto (klaku sur 'Langues').

• **Polaj kaj germanaj infanoj dum du semajnoj en Herzberg**
Jam la duan fojon okazis la du-landa Somera Arbara Lernejo (Salo), kiu ĉiujare kunigas dum duona monato Esperanto-lernantajn infanojn 12-ĝis-16-jarajn el la ĝemelurboj Góra (Pollando) kaj Herzberg, 'la Esperanto-urbo' (Germanio). Dum la kunrestado, de la 28-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto, ili interrilatis en la Internacia Lingvo en amika internacia etoso sub la gvido de geinstruistoj.

En siaj artikoloj la gazetaro emfazis, ke la ĉi-jara aranĝo karakteriziĝis per elstare riĉa programo, prizorgita de la loka Esperanta Interkultura Centro. Fakte, la infanoj estis dorlotitaj: ili amuziĝis en glitejo kaj naĝejo, lernis arkopafi, dancis diverslandajn popoldancojn, vizitis

It is not too late to take part in this year's

Course-you-can!

– an Esperanto course for beginners and post-beginners

19–21 October 2007 at Wedgwood Memorial College, Barlaston

- Ask for information from: Esperanto House. Tel. 0845 230 1887; e-mail: eab@esperanto-gb.org
- Check out our education website www.esperantoeducation.co.uk or see the July-Sept. issue of *EAB Update* (back page).

bestoparkon, esploris groton, ekskursis al turismaj lokoj, publike koncertis en Esperanto kaj migradis en arbaro. Ne mankis, kompreneble, instrua parto, konsistanta el praktikado de la lingvo kaj fina ekzameno.

La partopreno en la renkontiĝo estis senpaga, ĉar ĉiujn kostojn kovris la du urboj, la Pol-Germana Junulara Fondaĵo kaj privataj patronoj.

Tre impresa estis la favoro de Urbestro Gerhard Walter, kiu oficiale akceptis kaj regalis la partoprenantojn en la urbo-domo, persone gvidis tablotenisan turneon (eĉ ludis en ĝi kun la infanoj), disdonis pokalojn kaj donacojn, prezidis diversajn publikajn aranĝojn kaj plurfoje vizitis la kunvenojn.

• **Kooperativa solidareco – kun Esperanto**

La Nef (www.lanef.com) estas franca kooperativa banko – la sola franca etika banko. Ĝi ek-laboras kun Fiare (hispana etika banko) kaj Banco Ethica (itala etika banko) por krei internacian etikan bankon, kies etika bazo estas solidareco. Artikoleto de Claude Grojant (esperantisto kaj

societano de Nef) en *Vif Argent* (la gazeto de Nef, sendata al ĉiuj societanoj) proponas proksimiĝon kaj invitas la societanojn, kiu praktikas Esperanton konigi sin kaj poste starigi reton dank' al Esperanto kun la du aliaj bankoj hispana kaj itala.

Krom tio, ke estas grave montri, ke Esperanto estas ĉiam tie, kie ĉeestas la etikaj valoroj, tio donas al britaj kaj aliaj esperantistoj konkretan motivon proponi la etikajn valorojn de Esperanto al la brita kooperativa movado. (Laŭ informo de Corinne Daudier kaj Gazetara Servo de SAT-Amikaro.)

• **Ĉu feliĉa Esperantujo?**

Dum prelego pri aziaj ekonomioj prezentita en la Kongresa Universitato ĉe la Jokohama UK, oni sugestis, ke se oni taksus Esperantujojn laŭ la feliĉo-koeficiento, kiel oni taksis la loĝantaron de diversaj landoj, Esperantujo kredeble montriĝus la plej feliĉa komunumo en la mondo.

• **Enretigo de *L'homme qui a défié Babel***

Kun konsento de la direktoro de la eldonejo L'Harmattan, la

Korespondpetoj

Bonan tagon! Mia nomo estas Benoît. Mi naskiĝis en 1972 en Francio, ĉe la atlantika marbordo, en la departemento Vendee. Mi estas franco. Mi loĝas sola en apartamento. Antaŭ du monatoj mi komencis lerni Esperanton. Ĝi estas tre interesa lingvo. Mi ŝatus diskuti kaj korespondi skribe (per retadreso) kun iu en Britio, ĉar mi volas plibonigi mian Esperanton. Mia retadreso estas: bbo72@orange.fr. Amike, Benoît.

Saluton! Mi nomiĝas Jacek kaj mi loĝas en la urbo Tychy en suda parto de Pollando. Mi havas tridek kvin jarojn kaj mi estas fraŭlo. Mi interesiĝas pri muziko kaj filozofio. Mi ludas gitaron. Mi laboras ĉe la renovigoj, precipe mi gipsas kaj farbas. Mi deziras korespondi kaj ekkoni la kulturon de via lando. Mi atendas vian retmesaĝon. Mia retadreso estas: jackins@o2.pl. Salutas Jacek.

antaŭparolo de d-ro Zaleski-Zamenhof kun la du unuaj ĉapitroj de *L'homme qui a défié Babel* – la biografio de L.L. Zamenhof verkita de René Centassi kaj Henri Masson – estas nun enretigitaj ĉe: www.esperanto-sat.info/article1028.

La libro aperis ankaŭ en Esperanto, en la hispana, korea, litova, kaj estas tradukita en la ĉeĥa (sed ankoraŭ ne publikigita). Pliaj detaloj – opinioj pri ĝi, eltiraĵoj el nacilingvaj recenzoj – estas troveblaj, en Esperanto kaj la franca ĉe: www.esperanto-sat.info/article1010 kaj www.esperanto-sat.info/article235.

• Gimnaziaj kontaktoj

Por la gimnazio en Herzberg, la germana Esperanto-urbo, oni jam peris sukcesajn kontaktojn kun gimnazio en Budapeŝto, aldone al ĝia ĝemelurbo en Góra, Pollando, kaj nun pro klasvizitoj ankaŭ kun gimnazio en Nov-Brunsviko, Kanado (dank' al samideano Jean Codjo, origine el Benino, kiu vizitis la estron de la gimnazio en Herzberg). La g-direktoroj vere ĝojis kaj laŭdas Esperanton. Nun oni serĉas kontaktojn kun gimnazio en Italio.

• Du britoj premiitaj

En la Belartaj Konkursoj de UEA ĉe la UK en Jokohamo, Geoffrey Sutton gajnis la unuan premion 'Luigi Minnaja' pro sia eseo 'Pri la periodoj de la Esperanta literaturo' kaj Michael Cayley gajnis la duan premion en la branĉo 'poezio' pro 'Memoroj'.

• Turisma prospekto petebla

Kolora turisma prospekto pri la urbo Herzberg nun haveblas en Esperanto. Oni povas mendi ĝin de: Stadt Herzberg am Harz-Touristinfo, DE-37412 Herzberg, Germanio. Krome, oni produktis kvar bildkartojn kun surskribo en Esperanto, kiuj inkluzivas unu pri la Interkultura Centro. Per ĉi ties vendado oni iom subtenos agadon por Esperanto. □

Venu al la Aŭtuna Kunveno de la Nord-Okcidenta Federacio

Kun plezuro ni invitas vin partopreni denove en nia Aŭtuna Federacia Kunveno, je sabato, la 6-a de oktobro, ĉe Hotelo Eaton, City Road, Chester, kvin minutojn piede, dekstraflanke de City Road, for de la stacidomo, tuj transirinte kanalponton.

Bonvolu alveni post la 11-a horo a.t.m., ĉe la salono, enirinte la hotelon, maldekstren. Tie eblos aĉeti loteri-biletojn kaj brokantajn librojn favore al la Federacia kaso. Plena bufeda lunĉo, ankaŭ kun pladoj taŭgaj por veganoj kaj vegetaranoj, estos servataj je 12.30, proksimume, kiam espereble ĉiuj partoprenantoj estos jam alvenintaj.

Post la lunĉo okazos mal-longa komitat-kunsido, post kio nia gastparolanto, Peeter Aitai el Estonio, faros la ĉi-jaran

prelegon memore al Antonia Rostron Van Ess.

Post la paroladon estos te/kaf-paŭzo kaj la loteri-eltirado. Post tio, ni disiĝos en du konversaciajn grupojn ĝis la fino. Ni devos forlasi la restoracion je la 5.30 p.t.m., sed eblos resti en la salono.

La kotizo por la tuto estas £9,50, kiu inkluzivas bufedan lunĉon kaj posttagmezan teon/kafon. Eblos ankaŭ aĉeti laŭvole ĉe la Hotela salono/trinkejo. Bonvolu sendi vian ĉekon por £9,50 kredite al 'Ian Mac Dowall', 40 Danehurst Road, Wallasey CH45 3JJ, kiel eble plej rapide, sed plejlaste la 3-an de oktobro.

Ian Mac Dowall

Rete: MacDowallian@aol.com

Membership News

New Members

Ron Coverson, London
M.A. de M. Duske, London
Martin Frain, Stoke-on-Trent
David Gilmour, Glasgow
G.A. Hickman, Birmingham
H. Reid, Glassford, South Lanarkshire
Ms R.C. Welfare, Felixstowe

Completed the Free Postal Course

Merle Adams, Great Dunmow

Advanced Exam

Adrian Pilgrim, Isle of Man – Diploma (Merit)

Deceased

Ms R.S. Fitton, Huddersfield
Thelma Wilkinson

Eastern Federation meeting in Maldon – 27 October

The Eastern Esperanto Federation will be holding its annual autumn meeting in Maldon on 27 October. Please contact: Roy Simmons, 'Esperantujo', 12 Packard Place, Bramford, Suffolk IP8 4HA. Tel. 01473 461346; e-mail: rokeby@globalnet.co.uk


Nekrologo

Antaŭnelonge mortis Marvin Stanley, Norda Irlando. Li dum multaj jaroj laboris en Nederlando kiel la ĉefkont-isto ĉe la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio.

BROKANTAJ libroj

HB = bindita, SB = broŝurita. Prezoj inkluzivas afrankon kaj pakadon.

- Adoru Kantante* 262 evangeliaj himnoj kun melodioj. KELL, 1971. HB, p.287. £3,00
- Bakĥantinoj* Eŭripodo el la greka tradukis Albert Goodheir. Gajnis trian premion en la Belartaj Konkursoj de 1975. Glasgovo: Kardo, 1975. SB, p.40. £1,30
- Brand* Henrik Ibsen. El la norvega tradukis Erling Anker Haugen. Poem-dramo, ilustrita de la aŭtoro. La Laguna/Nederlando, 1978. SB, p.320. £3,00
- Batalo de l' vivo* Charles Dickens. Ĉefe el la germana tradukis L.L.Zamenhof. 3-a eldono. Amsterdamo: FLE, [1955]. HB, p.128. £3,00
- Epifanio aŭ kiel vi volas* William Shakespeare. El la angla tradukis William Auld. Glasgovo: Kardo, 1980. SB, p.72. £1,50
- Etulaj aventuroj* Zora Heide. Verkita originale en Esperanto. Stokholmo: Författarens Bokmaskin, 1983. SB, p.100. £1,50
- Forkaptita* R.L. Stevenson. *Kidnapped* el la angla tradukis Albert Goodheir. Bonega stato, krom tio ke la kovrilo estas renversita. Glasgovo: Kardo, 1976. SB, p.181. £2,20
- Hans Christian Anderson – lia vivo kaj verkoj.* Chr. Heilskov. Honkongo: Orienta Kuriero, 1938. SB, p.63. £1,00
- Hungara antologio* redaktis K. Kaloscaj. Kunlaboris: J. Baghy, K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi. Budapeŝto: Literatura Mondo, 1933. HB, p.460. £2,50
- Hungara antologio* simile al la supra, sed aŭtografita de K.R.C. Sturmer. £3,00
- Kalevala* Tradukis Johan Edvard Lappakoski. Praepopeo kaj centraĵo de la finna kulturo. Kristalklara traduko! Helsinko: Fondumo Esperanto, 1964. HB, p.368. Tre bona stato. £5,00
- Joĉjo Mulato* Menotti de Picchia. El la portugala tradukis Geraldo Mattos. Rakonto en flua poema formo pri simpla, nekulturita kampulo, kiu aŭdacis ami filinon de bienulo. Plus 'La maskoj', dramo por tri homoj. Chapecó: Fonto, 1997. SB, p.106. £1,50
- Kie boacoj vagadas* Eija Salovaara. Originala romano en Eo pri Laponio. 2-a eld. Vieno: Pro Esperanto, 1994. SB, p.87. £2,00
- Liliputo* Jonathon Swift. El la angla tradukis Edward Ockey. La unua vojaĝo de Gulivero. Kontrolita de Literatura Akademio. Anglio: Frank Maitland, 1961. SB, p.63. £1,00
- The Life of Lidia Zamenhof, Daughter of Esperanto* Wendy Heller. Biography in English. Oxford: Ronald, 1985. SB, p.260. £2,60
- Esperanta antologio – poemoj 1887-1937* redaktis William Auld. 1-a eld. La Laguna: Stafeto, 1958. p.622. SB £2,60; HB £5,00
- Ni komedietas* Zora Heide. Ok unuaktaj amuzaj teatraĵoj, ege mallongaj. Åbyhøj: Dana Eo-Eldonejo, 1971. SB, p.32 £0,90
- Naŭlingva etimologia leksikono* Louis Bastien. Londono: Esperanto Publishing Company, 1950. HB, p.317. £2,00
- La Sankta Biblio – Malnova Testamento.* El la hebrea tradukis L.L. Zamenhof. B&F Bible Society, 1947. HB, p.222. £3,00
- La venecia komercisto* W. Shakespeare. El la angla tradukis Alfred E. Wackrill. Londono: BEA, 1914. HB, p.101. £2,00
- Vojaĝo en Esperanto-lando* Boris Kolker. Perfektiga kurso en bonstila Esperanto. 26 lecionoj, per kiuj vi profundigos vian konon pri Esperanto kaj ĝia kulturo. Moskvo: Progreso, 1992. SB, p.337. £2,00
- Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud* Jen Ribillard. Verkita en Esperanto. La vivo tra la okuloj de dezerta azeno. La Laguna: Stafeto, 1963. SB, p.143. £1,30
- The Sonnets/La sonetoj* W. Shakespeare. El la angla tradukis W. Auld, kun la originalaj anglalingvaj sonetoj sur la kontraŭa paĝo. Pizo: Edistudio, 1981. HB, p.321. £5,00
- Skota antologio* tradukintoj inkluzivas W. Auld, J.S. Dinwoodie, J. Francis, A. Goodheir, H. Martin, R. Rossetti, D. Kennedy. Prozo kaj poezio, kun antaŭparolo de W. Auld. Glasgovo: Kardo, 1978. SB, p.255. £2,20





Nova literatura periodaĵo

Beletra Almanako

Redaktas Jorge Camacho (ĉefredaktoro), Probal Daŝgupto kaj István Ertl (redaktoroj). Eldonas Ulrich Becker (Mondial, Novjorko). La unua, jam aperinta, numero havas, escepte, 176 paĝojn – grando 21 x 13,3 cm.

Fonto ĉesis aperi. Necesas nova internacia literatura revuo. Tamen la tempo ankoraŭ ne maturas por lanĉi paperan revuon monatan aŭ du-monatan. Pro tio Mondial decidis publikigi *Beletran Almanakon (BA)*. Principe, la almanakon oni ne nur povos aboni anticipe kiel revuon, sed povas ankaŭ mendi aŭ aĉeti kiel libron. *BA* aperas en normala mezgranda libroformato kaj estas facile mendebla, pagebla, aĉetebla, recenzebla aŭ donacebla al amikoj.

BA enhavas diversajn rubrikojn, nome pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, intervjuoj, leteroj, debato ktp, originale kaj traduke. Laŭ interkonsento kun

UEA, ankaŭ la verkoj premiitaj en la *Belartaj Konkursoj* aperas en *BA*. Aperas en *BA* materialo speciale verkita por ĝi, sed ankaŭ altkvalitaj tekstoj jam pli frue aperintaj en la reto sed ne surpapero. Ni invitas vin proponi aŭ anonci materialon, propran aŭ aliulan (vidu niajn regulojn por formatigo de manuskriptaj tekstoj, en la reto: www.librejo.com).

La nerabatita prezo de unu *BA*-kajero de 120 ĝis 160 paĝoj estos 9 eŭroj. Aldoniĝas sendokostoj de €7. Antaŭmendantoj de *BA* povas ricevi ĝin por €6 plus sendokostoj de €7 (sendokostoj de €7 validas por unu aŭ du ekzempleroj. Por pli da ekzempleroj skribu al: informo@librejo.com). Antaŭmendoj devas atingi la eldonejon unu monaton antaŭ la apero de la mendata kajero. *BA 1* jam aperis fine de septembro, kun la rezultoj de la *Belartaj Konkursoj*. Kaptu la okazon antaŭmendi sekvajn numerojn je la rabatita prezo. *BA 2* aperos komence de marto 2008; kaj *BA 3* denove septembre, post la UK 2008, kun la rezultoj de la *Belartaj Konkursoj*.

MENDOFORMULARO: Mia retroŝta adreso: @

Mi mendas:

BA1: ekzemplerojn je la kosto de €9 por unu ekz., plus €7 por sendokostoj. SUMO por BA1: eŭroj

Mi antaŭmendas:

BA2: ekzemplerojn je la kosto de €6 por unu ekz., plus €7 por sendokostoj. SUMO por BA2: eŭroj

BA3: ekzemplerojn je la kosto de €6 por unu ekz., plus €7 por sendokostoj. SUMO por BA3: eŭroj

SUMA KOSTO por BA1 – BA3: eŭroj

PAGMANIEROJ (marku la deziratan pagmanieron per kruceto):

Mi petas UEA-n debeti mian UEA-konton, kiu enhavas sufiĉe da kredito, je la supra sumo, favore al la konto MOVE-X. NB. Eblas transpigi al ĉi tiu konto pere de la oficejo de EAB (vidu paĝon 2) aŭ **mendi rekte ĉe EAB kontraŭ NUR £9 por unu numero (£7.50 + 1.50 p.&p.)**, kio estas aparte bona oferto.

Bonvolu debeti mian kreditkarton. Nomo sur la karto: Karto-numero, dato de senvalidiĝo (monato/jaro):

Mi iros al via retpaĝo www.librejo.com, klakos la ligon por sekura "kreditkarta pago" kaj plenigos la tian formularon.

Mi ĝiros al germana banko (Konto: Ulrich Becker, Commerzbank Berlin, IBAN: DE7612040000070847900, SWIFT: COBADEBBI20, konto-n-ro: 070847900, bank-kodo: 12040000)

Mi loĝas en Usono kaj sendas usonan bank-ĉekon al la malsupra poŝtadreso de la eldonejo.

La supraj pagmanieroj ne eblas por mi. Mi proponas la jenan pagmanieron (ekz. sendo de eŭrobiletoj je mia propra risko):

Urbo: Dato: Subskribo:

Mia adreso: Lando: Mia kompleta nomo: Strato k.a. detaloj:

Urbo kaj urbo-kodo:

Se vi ne mendas rete aŭ pere de EAB, bv. sendi la formularon en koverto al: Mondial, Ulrich Becker, 203 West 107th Street, Apt. 6 C, New York, NY 10025, Usono. Se vi havas demandojn, bonvolu skribi perrete al: informo@librejo.com